

# FENIX

ESPERANTO  
\*  
NEDERLAND



# FEN X

Forumo de Esperanto Nederland

[www.esperanto-nederland.nl](http://www.esperanto-nederland.nl)

Dumonata membrogazeto de *Esperanto Nederland*.  
ISSN 1384-6515

Membroj de *Esperanto Nederland* ricevas la gazeton; ĝi estas aparte abonebla nur por ne-membroj en eksterlando. Tarifo EUR 15.-

Por tiuj, kiuj tion bezonas, son-kasedoj kun la enhavo estas haveblaj. Informojn donas la sekretario.

**Redakcio:** <[redakcio@esperanto-nederland.nl](mailto:redakcio@esperanto-nederland.nl)>  
H. Bakker, Kastelenstraat 231II, 1082 EG Amsterdam,  
tel./fakso 020-64 21 853 <[hansbakker@raketnet.nl](mailto:hansbakker@raketnet.nl)>.

J.K. Hammer, Taxisstraat 7, 1505 AA Zaandam,  
tel. 075-616 69 31, <[ko.hammer@planet.nl](mailto:ko.hammer@planet.nl)>.

## Esperanto Publike:

Gazetartikoloj ktp estas bonvenaj ĉe redaktoro Hans Bakker, same kiel informoj pri mencioj de Esperanto en radio kaj televido. Bonv. indiki detalojn.

## Lingva rubriko:

Emiel Van Damme, Albert 1 straat 44,  
BE 1703, Schepdaal, Belgio.

## Teknika redaktoro:

Julia De Coster, Esperanto-Centro Antverpeno.

**Presado:** Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.

## ESPERANTO NEDERLAND

### Sekretario

Alfonso Pijnacker, Tulpstraat 110, 2841 AE Moordrecht.  
Tel. 0182-37 40 58 aŭ 06-513 762 57 //  
<[sekretario@esperanto-nederland.nl](mailto:sekretario@esperanto-nederland.nl)>.

### Membro-Administranto:

Remment Balk, Egeïschestraat 42,  
8303 EN Emmeloord. Tel. 0527-23 93 78 //  
<[membroj@esperanto-nederland.nl](mailto:membroj@esperanto-nederland.nl)>.

**Kasisto:** Els ten Hagen-Renses, Middenweg 587,  
1704 BH Heerhugowaard. Tel. 072-571 79 18,  
<[kasisto@esperanto-nederland.nl](mailto:kasisto@esperanto-nederland.nl)>.

**Poŝtkonto:** 37 55 22 nome de ESPERANTO NEDERLAND;  
**UEA-konto:** esne-h

**Informado/informmaterialo:** Ineke Emmelkamp,  
Arubastraat 12, 9715 RW Groningen.  
Tel. kaj fakso: 050-57 18 842.  
Retadreso: <[info@esperanto-info.nl](mailto:info@esperanto-info.nl)>.

**Instrua Servo:** Luit Staghouver, Julianalaan 25, 9781 ED  
Bedum. Tel.050-301 40 15, <[luitstaghouver@home.nl](mailto:luitstaghouver@home.nl)>.

### Studie-weekeinde:

<[studsemajnfino@esperanto-nederland.nl](mailto:studsemajnfino@esperanto-nederland.nl)> aŭ Marijke  
Lathouwers, Kruiszwijn 1205, 1788 LE Den Helder,  
Tel: 0223-643781.

## DATOLIMO:

Materialo por la venonta numero estas bonvena ĝis la fino de januaro. Sendu ĝin kiel eble plej frue, tiam vi ege helpas nin. Simpla teksto, kiel en elektronika letero, plej taŭgas, sed ankaŭ aldonaĵoj en Word aŭ Wordperfect estas bonaj.

Kompreneble ankaŭ paperaj kontribuoj estas bonvenaj. Krome tre bonvenaj estas bildoj por la frontpaĝo!

## ENHAVO

- 3 Esperanto Publike /J.U.Hommes,  
Centjara esperantisto / Malferma tago UEA
- 4 Institucio Hodler 40-jara / La Amsterdama katedro.
- 5 Mesaĝo Joseph B. Apasa / Infanoj malkovras kodon.
- 6 U.K. Bjalistoko: dudimensia temo / Fame-premio por IEI / Studo-semajnfino 2008.
- X Lingva Rubriko.
- 7 Studo-semajnfino 2009 / NGGE-jarkunveno.
- 8 Jilde Stern: Glacio-Edeno / 25-a PSI / Bibliaj Tagoj / Kelkaj novaj libroj - Recenzoj
- 9 Recenzoj.
- 10 Ĉiĉerono en Esperantujo.

## PRI PAĜO 1

Dum la malferma tago de UEA (la 29-a de novembro) interesaj antikvaj esperantaĵoj estis vendataj en bazaro en la dua etaĝo de la modernigita Centra Oficejo.

## DE LA REDAKCIO

Karaj legantoj,

En la lasta paĝo de la laste numero de la 13-a jarkolekto de Fen-X mi publikigis bildon, kiu malagrabla atentigis pri la danĝero kiu minacas nian asocion.

Kun iom da timo mi atendis viajn reagojn, ne nur kun timo ke vi koleriĝos pro la bildo, sed ankaŭ kun la espero ke inter la legantoj sufiĉe da homoj komprenos la averton, kaj zorgos, ke la danĝero malaperu...

Kun ĉagreno mi konstatas ke mi eraris... almenaŭ pri la sukceso de mia averto. Vere, inter vi estis kelkaj kiuj bone komprenis la mesaĝon, sed ĝis la nuna momento la respondoj ne sufiĉis por malaperigi la zorgojn de la estraro...

Ni nun vivas en individueca socio, kaj multaj homoj havas zorgojn pri la propra ekzistado, pri sia profesio, pri la daŭra devo pristudi novajn labormetodojn, lerni pri novaj materialoj. Tial la minaco kiun mi skizis certe ne trafas nur nian asocion, kaj similaj problemoj ekzistas ĉe multaj asocioj.

Tamen: mi nepre fidus, ke inter ni, esperantistoj, ekzistas tiom da idealoj pri pli bona mondo, ke mia averto ne estos vana kaj ke ni ĉiuj baldaŭ trankvile povos iri antaŭen.

Cetere: se vi pro iu ajn kaŭzo ne povas akcepti plenan estraran taskon, vi eble povus proponi al la estrara vian helpon por strikte limigita tasko.

Ko Hammer.

## LA VENONTA STUDO-SEMAJNFINO, MARTO 2009

Ni povas anonci ke la venonta studo-semajnfino okazos de la 6-a ĝis la 8-a de marto 2009. Ni mendis lokon en la grupdomo "de Strubben", Hoofdstraat 4 en Schoonloo, provinco Drenthe.

Legu la informojn en paĝo 7.



La karton iam eldonis FLE.

## ESPERANTO PUBLIKE

Pasis la kongresoj kaj la abundaj raportoj. Ne estas strange ke Esperanto malofte aperis en la aŭtunaj ĵurnaloj.

Unu membro de ESPERANTO NEDERLAND pro sia persona jubileo centjara kaŭzis la aperon de artikolo en De Stentor, regiono Apeldoorn, la 21-an de novembro. "Honderdjarige Hommes houdt liefde voor Esperanto" (Centjarulo Hommes restas amanta Esperanton) estas la titolo de simpatia intervjuo kun nia membro, kiu koncize klarigas al nunaj nesciantoj kio estas Esperanto. Sendis la artikolon Anneke Buijs, lia samklubanino.

Ans Heijstra ankaŭ ĉi-foje sukcesis publikigi en Noordhollands Dagblad, 4-10-2008, artikolon pri "Taal" (Lingvo). Ĉi-foje ne necesis reagi al jam aperinta artikolo. Ans verkas glate kaj trafe, sed mi ne sciis ke tion ŝi lernis de docento pri PR (Publikaj Rilatoj) kaj Komunikado. Tiu letere gratulis ŝin, i.a. per la vortoj: "Je bent en blijft een geweldige ambassadeur voor je club" (Vi plurestas bonega ambasadoro de via societo). Ni aliĝas al tiuj vortoj. Ŝia edzo Joop Heijstra sukcese prizorgis la Esperanto-tradukon de faldfolio je dispono de vizitantoj al la Grackapelo de Nia Kara Dipatrino je Mizerlo, Heiloo.

La monata gazeto "Filatelie" informas siajn legantojn pri la poŝtmarko kiun UEA eldonis pro sia kongreso en Rotterdam. La artikoleto invitas mendi per la retpaĝo de UEA: <[www.uea.org/katalogo/filatelie](http://www.uea.org/katalogo/filatelie)>. Posta numero de "Filatelie" bedaŭras la elĉerpiĝon de la kongresa pm, sed anoncas la jubilean UEA-poŝtmarkon, samkondiĉe akirebla.

"Arabesken" nomiĝas la revuo de Louis Couperus Societo. Ĝia novembra numero mencias en ilustrita artikolo la noveldonon de "Fatalo", verkaĵo de Couperus tradukita de Gerrit Berveling. Kaj eĉ jam dua eldonaĵo estas mendebla ĉe la libroservo de UEA: "Pri vagabondoj kaj friponoj, pri damoj kaj kavaliroj".

Plej laste: Ans Heijstra sendis "Molenwiekje" ĵus aperinta en la decembra numero de gazeto De Geestmolen. En ĝi ankaŭ Sankta Nikolao rekomendas lerni Esperanton.

Hans Bakker

## CENTJARA ESPERANTISTO

Niaj koraj gratuloj iras al Johannes Unico Hommes, kiu la 17-an de novembro festis sian 100-jaran naskiĝtagon.

Kaj ankoraŭ nun li amas la lingvon Esperanto, kiu donis al li multan feliĉon en la vivo, per kontaktoj kun la tuta mondo.

Li naskiĝis en Winschoten, kaj en 1940 ekloĝis en Apel-

doorn. Unue li estis instruisto ĉe lernejoj por infanoj kun problemoj, sed poste li instruis fremdajn lingvojn en mezaj lernejoj.

Kiel junulo li lernis la lingvon kun sia patro. Dum multaj jaroj li aktivis en la nederlanda asocio KUNE kaj la internacia KELI, asocioj por kristanaj esperantistoj.



Por ili li aktivis en "misia fako". Tiu eldonis bildkartojn kaj broŝurojn kun religiaj temoj, sed per ĝi kristanoj povis ricevi ekzempleron de la Biblio, se tiu en la propra lando ne estis havebla. Oni kelkfoje helpis ankaŭ per medikamentoj. Tio tiutempe certe gravis en la landoj kie

la komunismo regis. Similan fakon prizorgis la familio Sandgren en Svedio. Antaŭ ĉ. 15 jaroj lia edzino mortis, kaj nun jam dum ses jaroj Hommes loĝas en la loĝcentro Sprengenhof en Ugchelen.

## MALFERMA TAGO ĈE UEA.

La 29-an de novembro mi vizitis post kelkaj jaroj denove la malferman tagon de la Centra Oficejo en Rotterdam. Kiel ĉiam la akcepto estis agrabla, kaj la programo interesa. Alejandro Cossavalla koncertis kun sia gitaro kaj prezentis internacian programon. Grégoire Maertens rakontis pri la Instuticio Hodler, kiu jam dum 40 jaroj subvencias gravajn aranĝojn favore al Esperanto, por kiu la mono mankas. Vidu la sekvantan artikolon. Ankaŭ interesa, el historia vidpunkto, estis la prezentado de Andreas Künzli pri la tempo en kiu la centro de nia movado estis en Bern kaj Ĝenevo, kun historiaj bildoj, i.a. de la geedzoj Zamenhof.

Aktivaj junaj homoj prezentis siajn planojn por krei elektronikan mondon por Esperanto pere de e@i.

Tamen en mia raporto ne povas manki mia admiro pri la ŝanĝoj kiujn mi konstatis ĉe la oficejo mem.

Biblioteko Hodler, iam polvoriĉa paperamaso en malluma salono, nun bonorde troviĝas en bonaj modernaj arkivaj ŝrankoj.

La enirejo al la libro-vendejo aspektas agrable moderna, sen superflua demonstracio de nenecesa lukso per kiu oni kelkfoje klopodas imponi al klientoj, ekzemple ĉe aŭtovendejoj kaj bankoj.

La ĉambro de la direktoro memorigas pri efika laboro. En la dua etaĝo mirigis min vasta konferencejo, en kiu oni povas ĉeesti la prezentadojn multe pli agrable ol en la iama kelosimila "salono Zamenhof", kie nun estas la biblioteko.



Alejandro Cossavalla



Andreas Künzli

Sed ne nur la oficejo mem estis agrabla surprizo, ankaŭ la kvartalo kie la Centra Oficejo troviĝas. Antaŭ kelkaj jaroj Nieuwe Binnenweg prezentis mizeran aspekton de vendejoj de ekzotikaj nutraĵoj, interretaj kafejoj, turkaj fum-ejoj kaj aliaj komercoj de duaranga nivelo. Nun tamen tie troviĝas i.a. butikoj de luksaj mebloj kaj vestaĵoj, kaj grandaj art-galerioj, kaj ĝi neniel memorigas pri la mizera

aspekto de antaŭ kelkaj jaroj. Direktoro Osmo Buller dum interparolo kun mi klare esprimis sian kontentecon pri tio. Mallonge dirite: la nova aspekto de la oficejo kaj ĝia kvartalo nun donas al la publiko bonan impreson pri la valoro kaj la graveco de niaj lingvo kaj movado. Ni vere rajtas esti kontentaj.

Ko Hammer.

## INSTITUCIO HODLER 40-JARIĜIS

La julia-aŭgusta numero de "Esperanto" en 1968 raportis pri plano de la Estraro de UEA lanĉi kampanjon por "fortikigi la financon bazon de la Asocio". La artikolo emfazis: "Ne ekzistas en la mondo kulturaj organizaĵoj, laborantaj sen iu ajn subvencio, kiuj povas funkcii sen deficitaj nur per siaj membrokotoj. Iliaj manoj estas ligitaj pro konstanta monmanko. Prosperas nur tiuj, kiuj trovis aliajn fontojn de enspezoj."

La kampanjo celis kolekti kapitalon, kies rento liveru al UEA ekstrajn rimedojn aldone al kotizoj. Rezulte, la 28-an de oktobro estis starigita fondaĵo, kies oficiala nomo fariĝis Instituto Hodler '68. Ĝi ricevis propran juran personecon en Nederlando, kun estraro nomumata de la Estraro de UEA. Ekde la komenco ĝi kolektis donacojn kaj pruntojn sen rento aŭ kun malalta rento. La unua estraro konsistis el E.L.M. Wensing (prezidanto), Maurice Jaumotte kaj Evert J. Woessink, kiuj membris ankaŭ en la Estraro de UEA. Marianne Vermaas, kiu samjare rezignis kiel Direktoro de la Centra Oficejo, fariĝis la unua administranto.

La nuna prezidanto de la Instituto estas Grégoire Maertens, kiu eniris la estraron unuafoje en 1970 kaj estas prezidanto ekde 1986. En la estraro membras krome Ans Bakker-ten Hagen, Renato Corsetti, Ivo Durwael kaj Ilja De Coster, kaj la administranto estas Pasquale Zapelli. La ĉefa havaĵo de Instituto Hodler estas domo en Antverpeno, kiu estis akirita en 1980 kaj kiun luas Flandra Esperanto-Ligo

kaj la Antverpena Esperanto-klubo "La Verda Stelo". Ĉi-jare la Instituto aljuĝis subvenciojn je la suma valoro de 9200 eŭroj. La plej grandan subtenon, 5000 eŭrojn, ricevis Fondaĵo Canuto. Projektoj ekster UEA ricevis 1700 eŭrojn.

Kiu deziras prunti aŭ donaci monon al Instituto Hodler, bonvolu kontakti la Centran Oficejon por pli detalaj informoj.

- laŭ gazetara komuniko de UEA, 2008-10-29

## LA AMSTERDAMA KATEDRO

Informilo pri la katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo.

La 2-an de septembro komenciĝis la katedra kurso pri interlingvistiko, ĉiumarde de la 10-a ĝis la 13-a horo en salono de la Hooft-Domo. La definitiva nombro de la registritaj studentoj estas 14. La intertempaj ekzamenoj okazis la 23-an de septembro, la 28-an de oktobro kaj la 25-an de novembro. La Cseh-leciono, kutime donata de Atilio Orellana mezvoje dum la semestro, okazis ĉi-kurse la 14-an de oktobro.

La 9-an de oktobro, la dekana oficejo informis ke la universitata estraro aprobis la nomumon de WJ al la speciala profesoreco pri interlingvistiko kaj Esperanto. La 16-an de novembro IEI konfirmis la aprobon, kio signifas, ke la profesoreco ekvalidis la 1-an de novembro por kvinjara periodo.

La 20-an de oktobro estis kreita, surbaze de libervola aliĝo, retpoŝta rondo de studentoj kaj studantoj pri interlingvistiko kaj Esperanto. Ĝin mastrumas WJ kaj ĉi-momente ĝi havas 38 membrojn, kiuj estas retpoŝte provizataj per novaĵoj pri Esperanto, esperantologio kaj interlingvistiko, ne laŭ iu fiksa periodeco, sed neregule, laŭokaze kaj laŭbezone. "Novajoj" ne estas ĝeneralaĵoj el la E-movado, sed eventoj kun specifa intereso por la studentoj: la aĉeto fare de la universitata biblioteko de novaj libroj koncerne la fakon, atentigo pri esplorkampoj por bakalaŭraj aŭ magistras diplomverkoj, atentigo pri staĝo-okazoj (dum UK), atelieroj pri Esperanto, vizitindaj retejoj, k.t.p.

La interdisciplina esplorgrupo "Babela Eŭropo", en kiu partoprenas WJ kaj la kuratoro de la katedro, Hans Erasmus, kunvenis la 28-an de aŭgusto kaj la 31-an de oktobro. La fonda manifesto de la esplorgrupo kun klariga noto estas afiŝita en edukado.net. Kune kun partneraj universitatoj, "Babela Eŭropo", nome de UvA, respondos al konkursinvito de Eŭropa Unio por pristudi aspektojn de la enkonduko de Eŭropunia laborlingvo aŭ lingua franca. Se la Amsterdama propono venkos en la konkurso, WJ respondos pri speciala taskaro pri la planlingva solvo, kiu estas ĉi-momente redaktata.

En aŭgusto bakalaŭrigis Lotte Krijnen, studentino pri Lingvo kaj Komunikado, per diplomverkaĵo titolita "Pardonu min", en kiu ŝi raportas pri la uzeblo kaj uzado de t.n. ĝentilecostrategioj en Esperanto. Dum la studojaro 2006-2007 Lotte sekvis la katedran kurson de Esperanto kaj sukcese ekzameniĝis pri ĝi. En siaj esploroj ŝi preparis enketon, kiu estis dissendita al pli ol cent esperantistoj en Nederlando. La relative alta nombro da respondoj ebligis al ŝi detalan ellaboron de la temo, kiu demonstris la ekziston de bunta gamo de strategioj kaj trukoj. La verkaĵo estas afiŝita en edukado.net, kune kun mallonga esperantlingva resumo. WJ kunlaboris en la pretigo de ĉiuj tradukoj al kaj el Esperanto kaj en la konatigo de la studentino kun la koncerna Esperanto-literaturo.

Tiujn ĉi informojn la redakcio de Fen-X ĉerpis el pli kompleta informbulteno, prizorgata de Wim Jansen. Reagoj eblas ĉe

<wimjansen@casema.nl>  
aŭ telefonnumero 071-3617349.

## MESAĜO DE JOSEPH BICINGINI APASA

Merkrede (la 26-an de novembro) mi ricevis novan restadpermeson, sed same kiel la antaŭa ĝi estas 6-monata provizora karto (validas ĝis la 3-a de majo 2009).

Do ankoraŭ necesas atendadi decidon pri mia peto de statuso de rifuĝinto en Pollando. Nenio traktiĝas rapide en Pollando, do necesas prepariĝi al longa atendado.

Dum la someraj lernejoj mi skribis leterojn al diversaj oficejoj --inkluzive de universitatoj-- cele peti stipendion.

Ĉe universitatoj eblas almenaŭ akiri eblon studadi senpage. Fakte en ĉiuj publikaj universitatoj en Pollando polaj civitanoj studas senpage, sed por eksterlandanoj la studado estas multekosta. Tri universitatoj respondis al mi pozitive. Du el ili havas inĝenierigajn programojn laŭ mia ŝato.

La Universitato Politeknika de 0ódĭ montriĝis pli taŭga por mi ĉar ĝi havas programon franclingvan kaj krom tio ĝia reago venis ege frue. Por ke mi estu akceptita en la universitaton mi devis/as kunigi la postulitajn dokumentojn, vojaĝo kiu ĝis nun ne jam atingis finon. Mi sukcesis prezenti preskaŭ ĉiujn postulitajn dokumentojn, pro kio mi akiris provizoran akceptiĝon. Mi tiel rajtis ekstudi kaj loĝi en la internulejo de la universitato. Sed ankoraŭ mankas dokumento por kompletigi mian dosieron kaj mi akiras formalan akceptiĝon nur kiam mi prezentos ĝin. Temas pri dokumento por rekoni en Pollando mian diplomon de duagrada studado akirita en mia lando.

Pri mia studad-programo. Franclingve ĝi nomiĝas Gestion et Technologie (administrado kaj teknologio). Kiel montras la nomo, tiu programo entenas pli ol unu stud-kampon. La tuto preparas studentojn al diversaj industriaj profesioj. Ĝi do entenas la ĉefajn fakojn de la industria vivo: teknika (fabrikado, mekaniko, aŭtomatiko), informadika kaj administrada. Fakte en industria kompanio inĝeniero (teknika fako) kapablu plenumi ankaŭ aliajn taskojn (informadikaj sistemoj kaj administrado).

Kompreneble tia "dika" programo donas multajn labor-eblojn al diplomitoj kaj tial ĝi estas longa: Necesas studadi 4 jarojn por fariĝi inĝeniero kun diplomo de bakalaŭro. Ni studas franclingve, sufiĉe rara aĝo en Pollando.

Ekde fine de septembro mi loĝas en la internulejo de la universitato. Nuntempe mi loĝas kun 2 aliaj studentoj: unu el Senegalio kaj alia el mia lando Kongo. Ni ĉiuj interparolas france. La kongolandano estas de okcidenta parto de nia lando kie oni ne parolas la svahilan. Malsame de Bydgoszcz, ĉi tie mi devas mem aĉeti kaj kuiru miajn manĝojn. Ĉiumonate necesas pagi por la ĉambro ĉ. 80 eŭrojn.

Mia financa situacio nuntempe ĝuas iun ekvilibron, ĉar mi nun akiras komence de ĉiu monato socian helpon de ĉ. 200 eŭroj. Mi jam spertis ke tiu sumo kapablas kovri la bazajn elspezojn, t.e. loĝadon, manĝadon kaj elspezojn rilatajn al studado (elspezetoj kiel regulaj fotokopiado de libroj, aĉetoj de bezonataj materialoj, ktp), transporton en 0ódĭ, komunikadon (telefon-kartoj) kaj ĝenerale malmultekostajn aĉetendajn aferojn. Sed se necesos aĉeti ion multekostan kiun oni bezonas

(ekz. fridujo, presilo, vintroŝuoj aŭ -jako), mia monfonto malfacile kapablos navigi tion al mi. Krom tio ankaŭ vojaĝi aŭ partopreni eventojn estas malfacile, aŭ eĉ ne eblas. Kio multe malplaĉas al mi estas tio fakto ke mi ne scias precize kiam mi estos liberigita de tiu "malferm-ĉiela malliberejo" Pollando. Fakte mi ne rajtas vojaĝi eksterlanden nek labori ĉi tie; kaj eĉ se mi rajtus labori, laboroj ne haveblas, kaj mi ne taŭgos por multaj laboroj. Akiri statuson de rifuĝinto vere estus la plej bona solvo al miaj problemoj. Bedaŭrinde mi ne jam scias kiam mi akiros ĝin, aŭ ĉu mi finfine akiros ĝin. En nia ĉambro estas interreto, kio vere helpas kaj ŝparigas.

Mi ne jam renkontis esperantistojn en 0ódĭ. Mi telefonis al iu esperantisto kiam mi ĵus alvenis ĉi tien. Li klarigis ke okazas esperantistaj renkontiĝoj ie en 0ódĭ je kelkaj vendredoj. Sed vendrede mi ĉiam estas okupita en kursoj la tutan posttagmezon ĝis vespero. Lun tagon mi surhavis mian blankan T-ĉemizon kun la teksto "Esperanto Internacia Lingvo". Iu studento kiu rekonis kio estas Esperanto, sciigis al mi ke iu profesoro/instruisto en nia universitato estas esperantisto kaj kelkfoje faris kursojn de Esperanto. Bedaŭrinde lin mi ne jam renkontis.

Sane mi fartas bone. Mi esperas same por vi.

Joseph Bicingini Apasa (al. Politechniki 11/ 308, PL-90-924 0ódĭ, Pollando).

Mi ĝojas ke Joseph fartas bone. Sed estas klare ke "provizore" iom da helpo restos bonvena. Mi scias ke kelkaj subtenantoj pretas daŭrigi (modestan) subtenon. Se ankaŭ vi pretas subteni Joseph-on bonvolu sciigi tion al mi. Mi anticipe dankas vin.

Luit Staghouter  
(<luitstaghouter@home.nl>  
tel. 050-3014015)

## INFANOJ MALKOVRAS KODON



En la semajnfinaĵoj 4-a kaj 5-a de oktobro okazis granda evento por infanoj 7- ĝis 12-jaraj en la instituto por natursciencoj "Nemo" en Amsterdam. Infanoj devis malkovri la "kodon" de brajlo, hieroglifoj, maristaj flagoj, piktogramoj, ktp. La organizantoj invitis ankaŭ Esperanto Nederland kaj multaj infanoj lernis surloke la ciferojn en Esperanto. Per tiu "kodo" ili povis esprimi sian naskiĝojaron - kaj tiuj kiuj interesiĝis ekkonis ankaŭ aliajn elementojn de la lingvo.



Joke Hoobroeckx, Marianne van Gemert, Johan van der Hoek, Richard van Schaik kaj Hans Bakker instalas la tablojn kaj dum du tagoj deĵoris kun granda plezuro. Peter Ebenau kaj Benata Hengstmengel helpis dum kelkaj horoj. La helpvoko de Joke Hoobroeckx inter membroj de Esperanto Nederland efike varbis kunlaborantojn. Ankaŭ ĉi tie ŝi invitas vin anonci vian kunlaborem. Ŝi volonte notos vian nomon en sia listo de agantoj okaze alvokablaj.

Hans Bakker

## KONGRESA TEMO KUN DU DIMENSIOJ



En 2009 oni festos la 150-an datrevenon de la naskiĝo de d-ro L.L. Zamenhof. Tre konvene UN proklamis la saman jaron Internacia Jaro de Interpaciĝo. Estis do nature, ke la Estraro de UEA inspiriĝis de tiu koincido, kiam ĝi elektis "Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ" kiel la temon de la 94-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta de

la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto en Bjalistoko. La citaĵo en la vortumo de la temo devenas de la parolado de Zamenhof en la Kembriĝa UK en 1907.

La kongresa temo estos vaste traktata en la oficiala programo de la UK, sed la Estraro esperas, ke ankaŭ fakaj asocioj konsideros ĝin en siaj propraj dumkongresaj kunidoj. Krome, por la Internacia Kongresa Universitato oni bonvenigas prelegproponojn pri la kongresa temo. Ankaŭ la Belartaj Konkursoj aparte alvokas por siaj esea kaj filma branĉoj konkursaĵojn pri la temo. Fine, la temo evidente ne estas io specife rezervita por la UK. La Estraro instigas trakti ĝin en konvenaj manieroj kaj formoj en ĉiaj Esperanto-aranĝoj kaj en la Esperanto-gazetaro ankaŭ dum la cetero de la jaro.

## FAME-PREMIO AL INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUO EN HAGO

Fame-fondaĵo por stimuli la disvastigon de la Esperanto-kulturo, kun kiu la urbo Aalen en Germanio kunlaboras, transdonis la 19-an de oktobro 2008 sian 11-an Espe-

ranto-premion al Internacia Esperanto-Instituto. Antaŭaj laŭreatoj estis ekzemple Claude Gacond, Marjorie Boulton, la kantgrupo Kajto. La siatempa iniciato por tia distingito, aljuĝita ĉiun duan jaron, devenas de la mecenato, la esperantisto Franz Alois Meiners, kiu disponigis kapitalon. La komunumo Aalen ĉiam ebligas la festan ceremonion. La kunveno nun okazis en la urba biblioteko de Aalen, konata pro la gastigo de la germana Esperanto-librokolekto. La urbestro bonvenigis ĉirkaŭ 80 gastojn, inter ili kelkajn lokajn politikistojn. Li emfazis la malfermecon de Aalen al la mondo kaj la gravecon de la Internacia Lingvo.

Herbert Mayer, la prezidanto de Fame-fondaĵo, skizis la historion de la Haga institucio kaj la prezidanto de IEI, Ed Borsboom, germanlingve prezentis la estraranojn, tri el ili ĉeestis, kaj informis pri la profesoreco de Wim Jansen por la Esperanto-katedro en la universitato de Amsterdam. Post tio Atilio Orellana Rojas, direktoro de la IEI-oficejo, sprite kaj konvinke demonstris en provleciono la efikecon de la Ĉe-metodo.

La lastaj eroj de la solenaĵo konsistis el la enmanigo de la diplomo kaj ĉeko kun sekvaj dankvortoj de Borsboom. Tion li substrekis per konvena donaco: la libro "Vivo de Andreo Cseh", kiun li donis al la urbestro kaj al Karl Heinz Schaeffer, la organizanto el la Esperanto-rondo de Aalen. Muzikprezentado ornamis la omaĝon, en kies daŭro du junulinoj ludis pianon kaj violonon, per tio agrable alternigante vortojn kaj muzikon. Dum la sekva bankedo ĉiu havis ŝancon pli persone interkonatiĝi. Tiel finiĝis bone aranĝita, impona kultura matineo.

Els van Dijk.

## LA STUDSEMAJNFINO EN NOVEMBRO 2008.

Vendrededon la 14-an de novembro jam alvenis multaj studemuloj en De Banjaert, la Nivon-domon kie ni mendis lokon por 30 personoj. La supo estis preta, kaj oni povis interkonatiĝi kun la aliaj partoprenantoj. Kaj post tre agrabla kunestado ĉiuj trovis siajn litojn en la ankoraŭ tre nova domo. La lecionoj komenciĝis sabate je la 9.30-a horo. Wil van Ganswijk instruis tre lerte la 6 komencantojn.

Ili povis uzi la tielnomatan domĉambrom en la unua etaĝo. Rudi Koot povis akiri iom da sperto kiel staĝanto. La duan nivelon de komencantoj instruis Arjen-Sjoerd de Vries kaj Roel Haveman. Ili dividis la grandan salonon kun la grupo de komencintoj, al kiu instruis Bert de Wit. En tiu grupo oni povis ekzerci la paroladon, kaj Bert korektis kaj traktis la erarojn, se necese. Kaj Rob Moerbeek trovis lokon kun sia grupo de progresantoj en la halo, kie ili povis cerbumi pri diversaj temoj kiujn Rob kiel spertulo lanĉis.

Dum la paŭzoj la kafo kaj teo kun kuketoj gustis bone.







Unu el la partoprenantinoj, Kitty Balk, kunprenis ĵigo-puzlojn el la jaro 1935, kiuj rilatas al Esperanto.

Prizorgis ilin la geedzoparo Vinus kaj Marijke Lathouwers. Ili ankaŭ faris aĉetojn kaj kuiris la manĝojn. La purigadon prizorgis la partoprenantoj mem, laŭvice, sed la laboro estis faciligata de granda pormanĝilara lavaŝino, kiu fulmrapide purigis la manĝilaron. Ĉiu havis sian vicon kun tiu miraklo de elpensemo. Tiumaniere neniu havis la ŝancon retiriĝi de la lecionoj kun la preteksto de multege da laboro. Sur la menuo estis sabate : terpomoj kun karotoj kaj burĝonbrasikoj, kaj salato el laktuko, tomatoj kaj kukumo. Vinus preparis por la omnivoraj lardaĵoj, kaj Marijke por la vegetaranoj vegetaĵojn. Laŭdire ili gustis bone! Por plenigi la lastajn kavetojn en la stomakoj servis vanila- aŭ ĉokolado-kaĉo. En la dimanĉo la du "kuirejaj geprincoj" preparis "nasi goreng" (frititan rizon kun certaj legomoj kaj viandpecetoj aŭ ne, kaj frititaj ovoj) kun krupuko kaj arakida saŭco kaj legom-acidaĵo. Bananoj kompletigis la menuon de ĉi tiu bongusta varma lunĉo.

Sabatvespere post la lasta studohoro alvenis la Esperanto-ĥoro Malvo. Tio estas: la resto de tiu Alkmara kantgrupo, ĉar inter la partoprenantoj jam troviĝis 6 el la membroj. Ili kantis diversajn kantojn el sia repertuaro, kaj estis amuze rimarki la surprizon de multaj homoj ke Esperanto ankaŭ estas kantebla! En alia salono alia grupo festis iun familian feston, kaj ni devis disdoni al diversaj scivolemuloj faldfoliojn pri Esperanto.

Unu el la partoprenantinoj, Kitty Balk, kunprenis du ĵigo-puzlojn el la jaro 1935, kiuj rilatas al Esperanto. Ni dum nia 'trinkohoro' post iom da peno povis kompletigi ilin, sed neniu el la ĉeestantoj povis doni respondon al la demando: kie kaj kial estiĝis la du puzloj? Kitty povis rakonti ke la puzloj rilatas al iu konkurso, per kiu oni povis tiutempe gajni monon. Ĉu eble unu el la legantoj povas diri ion pri la puzloj? La fotoj de ili troviĝas en la retloko de EN.

Ni povas konkludi ke la studsemajnfino denove estis tre sukcesplena. Aliĝis 21 personoj, inter kiuj unu eksterlandano, el Bulgario. Estas tre amuze ke fakte la "najbarino" de la domo "Banjaert" ankaŭ trovigis inter la partoprenantoj/komencontoj! Ĉar ŝi loĝas en la sama strato en Wijk aan Zee, ŝi dormis hejme, sed ĉiutage estis ĝustatempe por partopreni la matenmanĝon! Ŝi estis nia ĉiĉerono dum

la tradicia promenado dimanĉposttagmeze, kompreneble laŭlonge de la strando !

## LA VENONTA STUDSEMAJNFINO, MARTO 2009.

Ni povas anonci ke la venonta studsemajnfino okazos de la 6-a ĝis la 8-a de marto 2009. Ni mendis lokon en la grupdomo "de Strubben", Hoofdstraat 4 en Schoonloo, provinco Drenthe. Trovigas 36 litoj en tiu tre intima domo, en unu- du- kaj kvarpersonaj ĉambroj kun varma kaj malvarma akvo. La domo ne estas Nivon-domo, kaj ĝi situas en belega arbaro. Jam rezervu la datojn, kaj mendu aliĝilon ĉe: Joeri Smolders, Warmoesstraat 7, 1521 CH Wormerveer, retadreso: <studsemajnfino@esperanto-nederland.nl> Por pliaj informoj vi kontaktu lin, aŭ: Marijke Lathouwers, Kruiszwijn 1205, 1788 LE Den Helder, tel. 0223-643781. <lj.lathouwers@quicknet.nl>.

## NGGE EN 2009

En la nova jaro 2009 NGGE okazigos sian Jarkunvenon la 4-an de aprilo. Ni invitas ĉiujn aktivulojn kaj interesitojn pri instruado aliĝi al nia fakgrupo. La jara kotizo fariĝis 25 eŭroj, sed se vi kontentiĝas per la interreta versio de "NGGE SCIIIGAS" kaj "Internacia Pedagogia Revuo", la organo de la internacia ILEI, sufiĉas 10 eŭroj, pagotaj al la konto 2315416 nome de "Esperanto Nederland – vakgroep NGGE" en Hillegom. Informojn vi ricevas de la sekretario Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, 2585 HW Den Haag; tel: 070-3556677, retpoŝte per <iesperanto@versatel.nl>.

Pasintjare eblis kompili "Eksamenan ekzercaron", kiun lejdena esperantisto Jan Beentjes el la testa originalo transformis en lernilon. Ĝi nun estas konsultebla per "edukado.net", dank' al la laboro de Katalin Kovats.

Se vi deziras la paperan version (korektitan), ĝia origina formo (por testi viajn sciojn: 34-paĝa) estas kostpreze (3 eŭroj) akirebla ĉe la prezidanto; la lernila versio ampleksas ĉ. 85 paĝojn kaj kostas (kostpreze) 6,40 eŭrojn ĉe R. Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, 1946 AE Beverwijk. <r.moerbeek@orange.nl>.

(Prezoj en Eŭropo: 4 eŭroj kaj 8 eŭroj)

## EIS - EDEN

*Es ist ein Land verloren,  
da wöchst ein Mond im Ried,  
und das mit uns erfroren,  
es glüht umher und sieht.*

*Es sieht, denn es hat Augen,  
die helle Erden sind.  
die Nacht, die Nacht, die Laugen,  
es sieht das Augenkind.*

*Es sieht, es sieht, wir sehen,  
ich sehe dich, du siehst.  
Das Eis wird auferstehen,  
es sich die Stunde schliesst.*

Paul Celan 1920-1970

## GLACIO, EDENO.

*Estas perdita lando,  
kie luno kreskas en la falaro,  
kaj ĝi estas frostigita kun ni,  
ĝi ardas ĉirkaŭe kaj vidas.*

*Ĝi vidas, ĉar ĝi havas okulojn,  
kiuj estas helaj teroj.  
La nokton, la nokton, la lesivojn,  
tion vidas la okul-infano.*

*Ĝi vidas, ĝi vidas, ni vidas,  
mi vidas vin, vi vidas.  
La glacio leviĝos  
antaŭ ol la horo bat-fermiĝos.*

Paul Celan 1920-1970  
Interpreto: Antaŭdiro

Centra en ĉi tiu poemo estas la perdo de la paradizo.

Sperti aŭ koni "la bonon sed ankaŭ multan malbonon" kaŭzas nedaŭran froston de la sento: "senkondiĉa amo".

Sed antaŭ ol la horo bat-fermiĝos, la interna sentovivo degelos kaj pleniĝos de la sento de "senkondiĉa fido" laŭ la poeto.

lic. Jilde Stern-Agema

## PRINTEMPA SEMAJNO INTERNACIA

La 25-a PSI okazos de la 10-a ĝis la 17-a de aprilo 2009 en St. Andreasberg, Germanio, en la Domo Sonnenberg. Ĝi atendas 150 partoprenantojn el 15 landoj, el kiuj minimume 30% estas infanoj.

La aliĝkotizo varias inter 115 eŭroj por infano en simpla ĉambro, ĝis 345 eŭroj por unulita luksa ĉambro, kaj estas pagenda antaŭ la 2-a de aprilo 2009.

La programo enhavas i.a. ekskursojn, diskutgrupojn, kursojn, artajn manlaborojn, filmprezentadojn kaj kulturajn versperojn. Estos ankaŭ diservo dum la paska nokto.

Informoj estas haveblaj ĉe Jörg Gersonde, Hermann-Wäschkestrasse 31, DE-06366 Köthen, aŭ ĉe <[www.esperanto.de/psi](http://www.esperanto.de/psi)>.

## BIBLIAJ TAGOJ EN MONAĤEJO NÜTSCHAU

**(20 - 24 oktobro 2008, Travenbrück (Schleswig-Holstein, Germanio).**

Ni estis sepope el tri landoj, Germanio, Nederlando kaj Svedio. Ĉeestis i.a. Pastroj B.Eichkorn kaj A. Kronenberger. Patro Willibald Kuhnigk OSB tie loĝanta estas esperantisto. Li prezentis Biblian Kurson pri la Psalmoj. Ni kantis el la ekumena preĝ- kaj kantlibro ADORU kaj partoprenis ankaŭ kelkfoje en la Diservoj de la benediktana komunumo. Ni legis multajn tekstojn el la Biblio.

La restado en la Monaĥejo plaĉis al ni, kaj ni multe kantis kaj preĝis. Ekstere brilis la suno kaj ni vidis la aŭtunajn kolorojn de la folioj de la arboj.

Kelkfoje tage Patro Willibald devis celebri en la benediktana preĝejo kune kun la aliaj monaĥoj. Tiam Pastro Albrecht Kronenberger kantigis nin per la libro ADORU kaj Psalmokantoj post ADORU.

Ni nun prezentas al vi mallongan resumon pri la

enhavo de la psalmoj. La enirpordego de la psalmoj estas psalmoj 1 kaj 2. Vidu la tutan psalmaron kiel ĝardenon de Diaj laŭdoj. Ili temas pri la rilatoj inter Dio kaj homo. En psalmo 22 estas la Pasiono. La pasiono finiĝas en psalmo 23. Nun regas nova paco kun Dio. Kulmino estas tuta psalmaro. Psalmo 90: Dio la Eternulo estas reĝo, granda espero. Dio mem kaj la Mesio. La interligo: la Eternulo regas. De la Dia Regno la centro estas Jerusalemo/templo. Ĝi estas tera kaj ĉiela urbo. En psalmo 147 estas la gloro de ĉiela Jerusalemo. La elirpordego estas en la psalmoj 149 kaj 150.

Estas diversaj specoj de psalmoj ekzemple laŭdpsalmoj 33, 135, 136. Estas invito, danko, kaŭzo de laŭdoj, kreitaĵo kaj savo el Egiptio. Eblas ne nur kanti, sed ankaŭ preĝi la psalmojn. En nia kantlibro ADORU vi povas trovi multajn ekzemplojn. Estas ankaŭ plendo-psalmoj. Kompreneble ne eblas priskribi ĉion. Tamen ni esperas, ke ĉi tiu artikolo estas valora por vi tralegi kaj agi.

Ĵaŭde la 23-an de oktobro posttagmeze ni iris kun Patro Willibald al la malnova monaĥejo. Li montris al ni la manĝejon kaj ĉambrojn de la monaĥoj, muzikĉambron, televidan ĉambron kaj la grandan bibliotekon.

Pastro Bernard Eichkorn,  
Pastro Albrecht Kronenberger kaj  
S-ino Gerda Dercks.

## KELKAJ NOVAJ LIBROJ

### KIAM MI ESTIS LA PLEJ FELIĈA EN LA VIVO?

Kelkajn semajnojn antaŭ la UK en Rotterdam aperis ĉe Editura Triade en Cluj Napoca, Rumanio, *Kiam mi estis la plej feliĉa en la vivo?* (ISBN 978-973-8313-71-2), kompilita de Júlia Sigmond kaj kun desegnoj de 14 personoj. Temas pri pli ol cent diverslongaj artikoloj kiuj en la lastaj jaroj aperis en la revuo BAZARO. Júlia Sigmond diligente



petis ke oni sendu sian artikolon pri tiu temo; bedaŭrinde ne ĉiu havis tempon aŭ emon sendi ion, tamen la rikolto valoras legadon kaj pripensadon.

Konataj kaj malpli konataj esperantistoj el multaj landoj rakontas pri sia plej feliĉa travivaĵo; ofte ligitaj kun spertoj en la mondo de Esperanto. La simpla nigra kovrilo kun ruĝa koro bone simbolas la enhavon!

En posta eldono estus rekomendinde almeti laŭalfabetan liston de kontribuintoj.

## BLANKO SUR NIGRO DE RUBÉN GALLEGO

Trista sorto por infanoj.

En 2007 eldonejo Mondial eldonis *Blanko sur nigro* de Rubén Gallego en la traduko de Kalle Kniivilä (ISBN 978-1-59569-072-2). La aŭtoro, nepo de iama estro de la komunista partio en Hispanio, naskiĝis en 1968 en Moskvo. Pro grava handikapo lia, oni sciigis la patrinon ke li baldaŭ mortos. Li vivis en diversaj infanejoj, pri kiuj li verkis ĉi tiun libron. Post la “falo de la muro” aperis sciigoj pri la tristiga vivo de mense handikapitaj infanoj en la iamaj socialistaj landoj kaj leginte *Blanko sur nigro* mi sciis ke bedaŭrinde oni ne troigis. La aŭtoro ne volas priskribi la aĉecon de la homa falo: “Mi ne volas. Mi verkas pri bono, venko, ĝojo kaj amo”. Li rakontas pri vartistinoj zorgemaj, instruistoj helpemaj - sed ankaŭ pri la regulo ke handikapuloj kiuj ne povas marŝi eniros maljunulejon kie ili baldaŭ mortos, kvankam ili estas mense sanaj, eĉ tre inteligentaj. Li nun loĝas en Usono, post kunigo kun sia familio. La titolon klarigas la enkondukaj vortoj: “Simple literoj, literoj sur la plafono, blankaj literoj malrapide rampantaj sur nigra fono. Ili komencis aperadi nokte, post ankoraŭ unu koratako. Mi povis movi la literojn sur la plafono, kunmeti el ili vortojn kaj frazojn. Matene restis nur noti ilin en la memoro de komputilo.” La antaŭparolo estis speciale verkita por la Esperanta eldono.

## ZAM-ZAM-ZAMENHOF, TEATRAĴO DE PAUL GUBBINS

En 2006 Eldonejo Bero eldonis *Zam-Zam-Zamenhof*, teatraĵon de Paul Gubbins (ISBN 1-882251-41-5), kun antaŭparolo de la aŭtoro.

Mi legis la komedion kun ĝuo. Ĉu eblas iam vidi ĝin, estas alia afero; ĝi bezonas aron da roluloj, kvankam multajn partojn povos ludi la sama grupo (EU-civitanoj, gastoj, lernejanj ktp.) Eble en klubkunveno la partoprenantoj povus ĉiuj laŭtleĝante prezenti unu el la personoj; se ili bone antaŭpreparas sin la rezulto devus esti vigla kaj amuza.

## UTILA ESTAS ALIĜO DE ULRICH LINS

UEA eldonis en 2008 *Utila Estas Aliĝo* de Ulrich Lins, (ISBN 978 92 9017 105 8), abunde ilustritan libron pri cent jaroj de UEA.

La pli ol 120 paĝoj enhavas tri eseojn: la ĉefaj trajtoj de la UEA-agado dum tiuj cent jaroj; pri la vivo, agado, idearo de Hector Hodler; pri Ivo Lapenna kaj ties jaroj antaŭ, dum kaj post la UEA agado. Kvankam la unua eseo jam grandparte aperis en “*Esperanto*”, mi denove tre ĝuis legi

ĝin kaj vidi la multajn fotojn. Ankaŭ la aliaj eseoj meritas relegadon, ne nur por pli bone koni “nian” historion sed por pli profunde koni la homojn kiuj tiel grave rolis en ĝi.

## THE LIFE OF LIDIA ZAMENHOF. DAUGHTER OF ESPERANTO.

Finfine haveblas Esperanta traduko de libro kiu en 1985 aperis kun la titolo *Lidia. The life of Lidia Zamenhof. Daughter of Esperanto*, verkita de Wendy Heller. (ISBN 978 90 77066 36 2) La tradukon prizorgis Bernhard Westerhoff, FEL eldonis ĝin malgrandkvante en 2008, ĝustatempe por la UK.

En antaŭparolo al la esperanta eldono la aŭtorino skribas i.a ke kelkaj modifoj estas faritaj kaj kelkaj malgravaj eraroj korektitaj; krome ŝi inkludis novajn informojn pri la lastaj tagoj de Lidia Zamenhof en 1942.

La originalon mi legis jaron antaŭ ol mi eklernis Esperanton (kion mi jam intencis sed devis prokrasti) kaj tiel mi iomete konis “nian” historian antaŭ ol fariĝi “lingvohava” esperantisto. Kun ĝuo kaj intereso mi nun relegas ĝin: ĝuo pro la bona, flua traduko, intereso, ĉar tra la jaroj mi forgesis multon el ĝi.

La libro komenciĝas per mallonga historio de D-ro Zamenhof kaj de Esperanto, kiu al la anglalingvaj legantoj verŝajne estis nekonata. Lidia Zamenhof vivis por du interplektitaj idealoj: disvastigi Esperanton kaj la bahaan kredon, kiun ŝi ekkonis pere de Martha Root, la usona bahaanino kaj ĵurnalistino kiu alportis la ideon de Esperanto kiel “unu lingvo” por la mondo al Oomoto.

Leginda libro en flua Esperanto kun multaj fotoj.

Kolekto plejeble kompleta de la verkaro de Lidia Zamenhof estas pli-malpli presopreta kaj aperos sufiĉe baldaŭ.

## FATALO DE LOUIS COUPERUS.

Gerrit Berveling en 2008 tradukis kaj eldonis *Fatalo* de Louis Couperus. (VOKO, ne estas ISBN-numero). Jaron post vojaĝo al Skandinavio ĉi tiu romano aperis, en kiu la skandinavaj impresoj servis kiel fono.

Frank, riĉa juna viro vojaĝas tien kun sia amiko Berĉo, kiu finance tute dependas de li. Enamiĝo dumvojaĝa de Frank minacas la komfortan, luksan vivon de Berĉo, kiu per sukcesa intrigo disigas la junan paron. Nova renkontiĝo de Frank kun la juna virino klarigas ĉion tamen la rezulto montriĝas fatala al ĉiuj.

Jen ege mallonga priskribo de tre leginda, “nur” 130-paĝa romano (Couperus verkis multajn tre longe elŝpinitajn romanojn) en bonega traduko kiu bone redonas la stilon de la verkinto.

Anneke Schouten-Buys.



# ĈĪCERONO EN ESPERANTUJO

Informoj laŭ la decidoj de la lasta ĝenerala kunveno - 2008-05-24

## LA REVUO "FEN-X"

- Aperas je la komenco de ĉiu nepara monato.
- Kontribuoj estas bonvenaj ĝis la fino de tiu monato. Urĝaj komunikoj kelkfoje ankaŭ poste povas esti akceptataj.
- Tekstoj estas bonvenaj per e-poŝto, aŭ kiel aldono en WORD, aŭ WORDPERFECT. Prefere uzu la "x-kodon" por literoj kun ĉapeleto, aliaj sistemoj donas multan nenecesan laboron! Ankaŭ paperaj kontribuoj estas bonvenaj, prefere NE manskribitaj.
- BILDOJ: laŭ sistemo JPG, prefere ne malpli ol 200 DPI.
- Abonoj nur eblas por eksterlandanoj. (EUR 15.- jare).
- Redaktoroj estas Hans Bakker kaj Ko Hammer. <redakcio@esperanto-nederland.nl>  
Por ĉio kio rilatas al la ENHAVO de Fen-X, do NE por administraj aferoj.
- <membroj@esperanto-nederland.nl>  
Por transdoni ŝanĝojn en adresoj, telefon-numeroj ktp, aŭ pri mankantaj numeroj de Fen-X.

## KOTIZO

- EUR 27,50 inkl Fen-X, por samhejmano EUR 8,-.
- Por NEJ-membro inkl. Fen-X EUR 13,75;  
por samhejmano EUR 4,-.
- Subtenantoj: EUR 10,-.
- Fen-X estas aparte abonebla nur por ne-membroj en eksterlando. Tarifo EUR 15,-.

## ANBI = ALGEMEEN NUT BEOGENDE INSTELLING.

ESPERANTO NEDERLAND estas agnoskita de la imposta servo kiel "Institucio Celanta Publika Utilon" (ANBI). Tio donas specialajn avantaĝojn por tiuj kiuj donacas al ĝi kaj ĉe legacoj. Simpla kotizo ne estas imposte subtrahbla.

## MEMBROLISTO:

Membro povas peti membroliston de la membro-administranto. La listo ne estas kompleta ĉar ne ĉiu deziras ke lia/ŝia nomo estu en ĝi.

## STATUTO, REGULARO:

Membro sen interreto povas peti la statuton kaj la regularon de la sekretario.

KOMISIONOJ ktp.:

- Arbitracia komisiono: R. Moerbeek (2011), K. Ruig (2009), A. Schouten-Buys (2010) / rezervuloj: J.K. Hammer (2010), M. Van Oostendorp (2011).
- Kaskontrola komisiono: J. Bosse-Sibbel, B. Engel, rezervuloj: A-S. de Vries kaj J. Tuinder.
- Faulhaber-Komisiono: Els van Dijk-Kuperus, Ineke Emmelkamp, Els ten Hagen, Remment Balk.
- Mabeoone-fonduso: Subtenas specialajn agadojn de la sekcioj. Sub la asocia estraro.

- Ĵurio Verloren Van Themaat-premio:  
Wil van Ganswijk-Vlasblom, Kees Ruig, Silvia Pilger.  
La Ĵurio estas sendependa de la estraro.
- Sekr: Kees Ruig, Groesbeekseweg 53,  
6581 BJ MALDEN. Tel. 024- 358 03 20.
- Retejo: <<http://www.esperanto-info.nl>> kaj  
<<http://www.esperanto-nederland.nl>> //  
J. Hoobroeckx-Dooren, B. Klijn, I. Emmelkamp,  
M. van Oostendorp. Sendu viajn sciigojn al  
<[retejo@esperanto-nederland.nl](mailto:retejo@esperanto-nederland.nl)>.

## REPREZENTANTOJ:

- UEA-komitato-A: Ans J. Bakker-ten Hagen (2010)
- UEA-ĉefdelegito: - - -
- Eŭropa Esperanto-Unio: - - -

## ARKIVOJ

Arkivoj pri Esperanto estas libere konsulteblaj por ĉiu ĉe: Intern. Instituut voor Sociale Geschiedenis, Cruquiusweg 31, 1019 AT AMSTERDAM. Tel. (020) 668 58 66 / Fakso (020) 665 41 81.

Tie estas la ankoraŭ ekzistantaj arkivoj de nia propra asocio kaj ĝiaj antaŭuloj.

Informoj pri la arkivo estas troveblaj ĉe:

<<http://www.iisg.nl/archives/en/files/e/10929650full.php>>

## KONTAKTO KUN LA ASOCIO

Ĉu vi serĉas kontakton kun la asocio? Por tio sufiĉas kelkaj adresoj, kiujn vi facile povos memori. Jen ili estas:

- [sekretario@esperanto-nederland.nl](mailto:sekretario@esperanto-nederland.nl) (Alfons)  
Por normalaj komunikoj al la estraro kaj korespondo.
- [estraro@esperanto-nederland.nl](mailto:estraro@esperanto-nederland.nl) (estraro kun Ineke)  
Por aferoj tiom gravaj ke la kompleta estraro tuj konu ilin.
- [prezidanto@esperanto-nederland.nl](mailto:prezidanto@esperanto-nederland.nl)  
Por kontakto kun nur la prezidanto. (Nun vakas).
- [kasisto@esperanto-nederland.nl](mailto:kasisto@esperanto-nederland.nl) (Els ten Hagen)  
Por korespondo pri financoj, kotizoj, fakturoj ktp.
- [membroj@esperanto-nederland.nl](mailto:membroj@esperanto-nederland.nl) (Remment)  
Por transdoni ŝanĝojn en adresoj, telefon-numeroj ktp, aŭ pri mankantaj numeroj de Fen-X.
- [informado@esperanto-nederland.nl](mailto:informado@esperanto-nederland.nl) (Joke)  
Komunikoj pri Esperanto kiujn vi volas transdoni al gazetoj, radio-stacioj ktp. Ankaŭ proponoj kaj ideoj pri tio estas bonvenaj.
- [retejo@esperanto-nederland.nl](mailto:retejo@esperanto-nederland.nl) Komunikoj ekz. pri kunvenoj, kiuj estu elektronike troveblaj per interreto, invitoj al kunvenoj, adresoj de lokaj aŭ regionaj kontakt-personoj.
- [info@esperanto-info.nl](mailto:info@esperanto-info.nl) kaj  
[info@esperanto-nederland.nl](mailto:info@esperanto-nederland.nl) (Ineke E.)  
Ĉi tie vi povas peti informojn, kaj ankaŭ mendi informilojn, broŝurojn ktp.
- [studosemajnfino@esperanto-nederland.nl](mailto:studosemajnfino@esperanto-nederland.nl) (Joeri Smolders)  
Ĉi tie vi povas aliĝi al studo-semajnfino, aŭ peti informojn pri ĝi.

## NEDERLANDAJ ASOCIOJ

### NEJ - Nederlanda Esperanto-Junularo.

NEJ nuntempe uzas la adreson de UEA:  
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ ROTTERDAM,  
tel. 010-436 15 39. Fakso 010 436 1751.  
Ralph Schmeits, oficisto de UEA aktivas por NEJ.  
<info@esperanto-jongeren.nl>

### ANSE - Asocio Nederlandaj Sciencistoj Esperantistaj.

Sekr. Rob Keetlaer, Leemkuilen 273, 5683 BZ BEST.  
Tel. 0499-39 37 61.

### NOSOBE - Asocio por esperantistoj kun vid-handikapo.

Vi povas kontakti la societon per:  
J. Wieringa, Julianalaan 8, 9801 BN Zuidhorn,  
tel. 0594-50 31 16, <wiewat@hetnet.nl> aŭ:  
Elise Lauwen, Salahutuplein 45, 5262 ZN Vught,  
tel. 06-51855 488, <eliselauwen@hotmail.com>  
Retpaĝo: <www.nosobe.nl>.

### NEDERLANDA KATOLIKO

Asocio de Katolikaj esperantistoj en Nederlando.  
Sokr. S.P. Smits. Lange Noordweg 3,  
4453 RC 's-HEERENHOEK. Tel. 0113-35 14 56.  
<spsmits@hotmail.com>

## INTERNACIAJ ASOCIOJ

### UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo: Nieuwe Binnenweg 176,  
3015 BJ ROTTERDAM, tel. 010-436 15 39.  
Fakso 010 436 1751. <uea@inter.nl.net>  
Libroservo: <http://www.uea.org/katalogo>

### SAT

67 Avenue Gambetta, FR 75020 Paris, Francio.  
Repr. Por Nederlando: C. Kwantes, Marnixstraat 57,  
2023 RB HAARLEM, Tel. 023-527 65 61.

### IEI

Sokr. Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172,  
2585 HW DEN HAAG. Tel. 070-355 66 77.  
<iesperanto@versatel.nl>

### INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO EN VIENO

En nove restaŭrita palaco en la centro de Vieno.  
Adreso: Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo,  
Palais Mollard, Herrengasse 9, AT 1010 WIEN.

La deĵoraj horoj estas:

Esperantomuzeo: lunde ĝis merkredo, vendrede, sabate  
10h00 - 14h00 / ĵaŭde 15h00 - 19h00

Kolekto por Planlingvoj: lunde ĝis merkredo, vendrede  
9h00 - 16h00 / ĵaŭde 12h00 - 19h00

Poŝtadreso: Sammlung für Plansprachen und Esperanto-  
museum der Österreichischen Nationalbibliothek  
(Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo),  
Josefsplatz 1 / Postfach 308 / 1015 Wien.  
- Kathrin Delhougne, / Tel.: (+43 1) 53410-732 /  
<kathrin.delhougne@onb.ac.at>  
<plansprachen@onb.ac.at>  
<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.  
htm>

**Alia muzeo: Esperanto-Muzeo en San Pablo de Ordal,  
Barcelono, Hispanio.** Fondita dum la 10-a Barcelona  
Esperantista Renkontiĝo, 1968. Vidu la Jarlibron de UEA.

## UNIVERSITATA BIBLIOTEKO

La biblioteko de la Universitato de Amsterdamo posedas  
kolekton de libroj kaj gazetoj en kaj pri Esperanto, kiu  
nombras pli ol 3000 titolojn.

Parton de tiu stoko konsistigas la libraro de la landa aso-  
cio 'ESPERANTO NEDERLAND', kiun la universitato  
mastrumas por ĝi. La kolekto estas katalogita kaj rete  
konsultebla. La adreso de la libere alirebla katalogo es-  
tas: <http://opc.uva.nl>. De la bonveniga paĝo vi povas  
elekti inter nederlandlingva kaj anglalingva daŭrigoj. Al-  
klaku la supran ligon 'Catalogus van de Universiteit van  
Amsterdam' aŭ 'Catalogue of the Universiteit van Amster-  
dam' por atingi la elirpaĝon por viaj katalogaj esploroj. En  
la serĉlinio 'zoeken' aŭ 'search' tajpu la du mallongigojn  
'tac esp' (sen citiloj, sed kun unu interspaco) kaj konfirmu  
(tac esp signifas 'taalcode Esperanto', t.e. 'lingvokodo  
Esperanto'). Responde vi ricevas komunikon pri 3104  
trafoj, kiu estas la E-kolekto, ekrane trairebla en sia tuta  
amplekso. Anstataŭ tajpi 'tac esp' vi povas uzi la indikitajn  
serĉkriteriojn, kaj tuj serĉi laŭ titolo, aŭtoro ktp.  
De ĉiu trovita titolo vi trovos la aŭtoro(j)n, eldoniston,  
eldonjaron, bindmanieron, eventualan serian apartenon,  
referencnumeron, fizikan situon de la volumo kaj infor-  
mojn pri la prunteblo kaj disponeblo.

Wim Jansen

## VID-HANDIKAPITOJ

La teksto de diversaj revuoj estas havebla kiel son-  
kasedo por tiuj kiuj tion bezonas.

- Revuo Fen-X - senpage.
- Revuo Esperanto de UEA - EUR 15.-
- Revuo Monato - EUR 15.-.
- Internacia Pedagogia revuo - senpage / Legas: Hein Wernik.
- Heroldo de Esperanto - senpage

La kaseda servo de NOSOBE registras ankaŭ la `Duan  
bultenon` kaj la `Kongreslibron` de la Universalaj kon-  
gresoj.

Informoj kaj mendoj iru al: Rob Moerbeek,  
Zwaansmeerstraat 48, 1946 AE Beverwijk.

- Revuo Kontakto de TEJO - legas kaj administras Elise Lauwen, Salahutup[lein 45, 5262 ZN Vught.

## STUDO-SEMAJFINOJ

Dufoje en la jaro okazas Studo-semajnfino. Okazas  
kursoj en je diversaj niveloj, de absolutaj komencantoj  
ĝis progresintoj, ĉiu estas bovna.

Ofte la kunvenoj okazas en Naturamika Domo.  
Inf.: Marijke Lathouwers, 0223-643781 (Kruiszwijn 1205,  
1788 LE Den Helder).

<lj.lathouwers@quicknet.nl> aŭ: Juri Smolders,  
075-6123471, <studieweekinde@wanadoo.nl>.

## INFORMILOJ

Por informaj kampanjoj la asocio povas havigi al vi afiŝojn,  
glumarkojn, faldfoliojn ktp.

Petu ĉe Ineke Emmelkamp, Arubastraat 12, 9715 RW  
GRONINGEN, tel. kaj fakso: 050-57 18 842. Retadreso:  
<info@esperanto-info.nl>. Informoj pri Esperanto:  
<www.esperanto-info.nl

# FEN-X

14a jarkolekto, n-ro 1  
januaro - februaro 2009  
Esperanto Nederland  
H. Bakker  
Kastelenstraat 231  
1082 EG Amsterdam

**TNT Post**

Port betaald

Port payé

Pays-Bas